

1925 no 1 bud 4/10 10

# BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

## Enhavo:

Asen Grigorov : Al laboro !  
Dimčo Debeljanov : Legendo pri  
l'adulta princino, trad. A. Grigorov.  
Asen Grigorov : Dim. Debeljanov.  
K. de Kalocsay : Esperanta stilo.  
Zahari Zahariev : Lingvaj studoj.  
Esp.-movado, recenzoj, informoj.



ESPERANTISTA KLUBO  
České Budějovice.

Jaro VII

Septembro, 1925

№ 1

---

---

# BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO

STR. CAR BORIS, 69 — SOFIO

## Liveras:

Kurso de esperanto, IV eldono (Ada) . . . . .	20.—	lv.
Praktika gramatiko de internacia lingvo esperanto . . . . .	3.—	"
Cu estas ebla kaj necesa helpa i. j. (prof. Ŝiŝmanov) bulgarlingva . . . . .	—	"
„Esperanto” (prof. Ŝiŝmanov) propaganda broŝureto bulgarlingva . . . . .	2.—	"
Paroladoj de Zamenhof (apartaj kajeroj I—V) bulgarl. po Internacia Konferenco por komuna komerca lingvo (Venecia) bulgarlingva . . . . .	2.—	"
Esperanto-bulgara vortaro (Har. Bačvarov) bindita . . . . .	5.—	"
„ „ „ „ „ „ nebinita . . . . .	50.—	"
„ „ „ „ „ „ nebinita . . . . .	35.—	"
Slosilo de esperanto . . . . .	4.—	"
Esperanto-bulgara frazaro . . . . .	8.—	"
Albumo de Bulgaraj esperantistoj (eld. 1923) . . . . .	25, 35.—	"
Rememoroj de esperantisto (Ada) . . . . .	20.—	"
Bulgara Antologio (lv. Krestanov). . . . .	100.—	"
Ŝercoj kaj incitoj (20j ludkartoj kun demandoj kaj resp.) . . . . .	60.—	"
Apartaj numeroj de gazeto „Bulgara esperantisto”		
jaro II, III, IV, kaj V . . . . .	1.50	"
jaro VI . . . . .	2.50	"

Insignoj, propagandaj kovertoj, poŝtkartoj, portreto de Zamenhof.

Por poŝtelispezoj oni aldonu: en Bulgario 15%, en aliaj landoj 30%.

---

---

# BULGARA ESPERANTISTO

**ABONPAGO :**

por Bulgario  
40 levoj,  
por alilando  
2.50 sv. fr.  
aŭ egalvaloro

**MONATA ORGANO**

DE LA BULGARA ESPERANTISTA  
SOCIETO

**Adreso**

de la Redakcio  
kaj administracio :  
Sofia (Bulgario),  
strato Car Boris, 69

Rekomendita de la Ministerio de Publika Instruado por la lerneĵ-bibliotekoj  
per cirkulero № 1870 de 27. januaro 1922

## Al laboro!

La tuta bulgara esperantistaro scivole atendas la sepan jaron de nia kara „Bulgara Esperantisto“. Pasis ĝia frua infanaĝo, ĝi estas jam liberiĝinta de la vindaĵoj, kiuj ĝis nun gardis kaj ŝirmis ĝian delikatan estaĵon.

Oni povas diri, ke „Bulgara Esperantisto“ eniras jam la mondon.

De kelkaj jaroj mi kun granda intereso sekvis la disvolviĝon de nia organo. La unuaj paĝoj en esperanto, kiuj vibrigis mian animon por enamigi ĝin al nia lingvo kaj ideo — tio estis la literaturaj paĝoj de „Bulgara Esperantisto“.

Foliumante ilin mi sentis kiel io hejma kaj intima kaj proksima — io tamen granda kaj majesta alblovas min kaj potence kaptas mian koron. Mi tie mire rigardis la figurojn de konataj karaj poetoj bulgaraj, modeste sed bele kaj digne prenantaj parton en la vasta internacia kunvivo intelekta de ĉiuj nacioj. Mi per la bulgara poezio esperantigita sentis hejma ankaŭ la internacian lingvon mem, ĝian poezion kaj literaturon.

Kaj, eble ĉar tiuj paĝoj estis tiom malmultaj, mi despie ŝatis kaj amis ilin.

Nun, neatendite ni estas ĉeestantaj aliformiĝon de „Bulgara Esperantisto“.

Ĉar de la komenco de la nuna societa jaro Bulg. Esperant. Societo eldonas novan Esperanto-propagandilon — la gazeton *Есперанто*, destinitan por la bulgara neesperanta publiko; — pure propagandaj artikoloj ne plu estos presataj en „Bulgara Esperantisto“. Sed lasante al tiu bulgarlingva Esperanto-propagandilo la taskon almiliti la eksteran publikon, „Bulgara Esperantisto“ ankaŭ estonte restos interna, hejma ligilo inter la bulgaraj esperantistoj, ĝi ankaŭ estonte restos oficiala organo de Bulg. Esperanto-Societo, konservante per tio la aspekton de la malnova tipo de naciaj Esperanto-gazetoj. Tial ĉiuj Esperanto-grupoj en la lando devas aboni ĝin. Ĝia oficiala parto kun sciigoj el la societa vivo, organizaj demandoj, statistikado ktp. estos malgrandigita, sed ĝi daŭros ekzisti, ĉar ja estante destinata parte

por eksterlandaj samideanoj, „Bulgara Esperantisto“ servos al ili kiel spegulo de nia landa esperantista vivo kaj progreso. Ĝi do ne iĝos pure literatura gazeto. Ni havas jam la multe pli bonan „Literatura Mondo“, kiun „Bulgara Esperantisto“ ne povus kaj ne volus konkuri, tio estus lukso, kiun la nuna stato de nia movado (landa kaj internacia) ne ankoraŭ permesus.

Sekvante la vojon de sia disvolviĝo, la literatura fakto de „Bulgara Esperantisto“ grandiĝos, ĝi dominos en la gazeto.

El la malgranda larvo flirte flugas aeren belega, multkolora papilio.

Ĝi estu bone veninta en la vivon!

— „Bulgara Esperantisto“ estos la literatura ĝardeno de la bulgara esperantistaro. Ĝardeno, kulturata per la komunaj klopodoj de nia konscia anaro. Kun multe da fervoro, kun multe da amo ĉiu frato-plumulo do flegu sian bedon en ĝi.

Ni gardu nian „Bulgara Esperantisto“-n kontraŭ fiherboj kaj malbeligo.

Konkrete antaŭ ni staras kelkaj taskoj, de kies trafa plenumo dependas grandparte la bonsukceso de nia entrepreno.

La redakcio volas prezenti al la publiko la literaturan materialon ne tute senorde, sed sub kelka plano. Estas intencate ekz. aperigi apartajn numerojn dediĉitajn al po unu poeto bulgara, por per tio doni pli kompletan ideon pri ties verkado kaj literatura figuro; ja ĝi estas celo ne malplej grava inter la ceteraj.

Speciala atento estos turnata al la originala verkado en „Bulgara Esperantisto“. Ni bezonas jam propran originalan literaturon. Kaj nedubebla simptomo pri la forteco de nia movado estas la apero de originalaj Esperanto-poetoj. Ni kore akceptos ĉiun bonvolulon sur tiu kampo.

Kelkaj fakoj kaj rubrikoj faros la enhavon de „Bulgara Esperantisto“ varia kaj interesa: sociaj studoj, belartoj (poezio, pentrarto, muziko, skulptado ktp.), literatura kritiko, recenzoj, interesajoj tra la esperanta revuaro, lingvaj studoj kaj demandoj speciale por bulgaroj kaj de ĝenerala intereso. Konvenaj bildoj kaj portretoj.

Ĉar kelkaj novaĵoj (kovrilo, kliŝoj) postulos pliajn elspezojn, ilia firmigo dependos de la nombro de abonantoj. Do nia devo estu la abono kaj abonigo de la revuo. Ni ne permesu fiaskon por la bela afero pro monaj kauzoj.

Espereble „Bulgara Esperantisto“ per sia nova aranĝo kaj malalta abonprezo povos populariĝi ankaŭ ekster Bulgario. Tiam ni devas pensi pri niaj eksterlandaj samideanoj: kiamaniere plej digne prezenti al ili la veran spiriton de nia popolo, kion plej bonan el nia literaturo elekti, kion plej karakterizan liveri. Ni sentu nin respondaj pri tiu afero.

Sed por povi efektiviĝi tiun planon, la redakcio bezonas ankaŭ la nepran kaj intensan kunhelpon de niaj ja ankoraŭ tro malmultaj fortoj literaturaj.

Oni ne avaru sian helpon, oni bonvole prenu la belan ŝarĝon.

Jen do nia voko: ĉiu al laboro!

Asen Grigorov.

Dimĉo Debeljanov.

## Legendo pri l'adulta princino.

Mon âme est unu infante . . . .

Albert Samain.

. . . Kaj tie sur la bord', sur la dezerta bordo  
de l'ondoj, karesate kaj torturate — jen  
en gard' fidela sin altigas nigre-morta  
kastelo tre fatala de la antikva temp'.

En la ĝardenoj, pri timema sonĝ' revantaj,  
vibretas ros' venena de tim' kaj de amar',  
kaj en la mortan akvon de mortaj ŝprucfontanoj  
speglas sian sonĝon da arboj sonĝa ar'.

Kaj murojn kaj kupolojn la tempo formordetas,  
kaj unge premas tie kolonojn muska glu',  
neniu hela hor' korĝojon plu trumpetas,  
ĉar feston ne anoncas arĝenta korno plu.

Kelkiam nur, en sonĝ', senforta blov' ekblovas  
kaj en la vibro de l'momentvekita tint'  
sonoras la dolor' pri l'virga glor' malnova  
de iu vidva tron' senĝlora de l'pasint'.

\* \* \*

Kiu plorsingultis en  
la dezertiĝintaj haloj?  
Ĉu unuan sian klaron  
ĵus indulgis la silent'?  
Kiu sur la tur' ascendis  
kaj la manojn en amar'  
al silenta for' etendis  
de la malfidela mar'?  
Kiu tenis en ĝarden'  
spiron sub la nigraj branĉoj?  
— Sian vojon nur sensanĝe  
vagas luno en silent'.

\* \* \*

Kun doloro de la velka floro,  
de la frua frosto en la sin',  
mi demandas al la ventoj boraj  
kaj al luno — perfidint':  
vi, fremduloj, tra la landoj foraj  
sen laciĝo vojaĝante, ĉu

ne eksciis vi, ĉu eksonoros  
 super mi neniam plu  
 voĉo hela de la princ' fabela  
 kiu post langvor', melankoli',  
 sonĝe venis kaj promesis, ke la  
 bonojn ravajn ĝuos mi,  
 la enigmajn bonojn en la landoj  
 kie eĥon trovas ĉiu vok'  
 kaj printemp' ornamas per girlandoj  
 ĉiun ĝojon de l'am-log'.  
 Li sur min sin klinis kaj ridetis,  
 sed volinta ĉirkaŭpreni min,  
 la mallumo lin ĵaluze ĵetis  
 en glacia sia sin'.  
 Kaj ekflustris voĉ' karesa: estu  
 mia — kaj en promesita hor'  
 travaginte marojn dum tempestoj  
 venos mi al via bord'.  
 Kie estas li? — mi lin esperas,  
 brulas mi en senestinga brul', —  
 jen en koro la esper' fajreras,  
 jen obskuras fum-nebul' —  
 kaj se lin mi foje ekimagas'  
 tiam venĝe mia malĝojeg'  
 en la kavojn de l'volupto vagas  
 kien vokas ĝin la Pek'.

— „Jam ŝvebas tria nokto sur la dezerto mara,  
 kaj la mallumaj rokoj tutstrange reeĥadas,  
 alflua venis hor' — nur vi, princin', gardstaras,  
 kaj brulas la rigard' volupte vualata.

Ho venu, la hararon, la buklan disetendu  
 sur mia bask' — al vi klininte frunton fratan  
 dormigos pace mi per la liut' argenta  
 malĝojon vian antaŭ nemeritita fato.

Kaj rigardante nin, malkovros la ĉielo  
 la praeternan gloron de l'fora firmamento  
 kaj tutsilente ĝi faligos vian stelon  
 en la silentan maron de la forges' silenta.

Princin', la peton aŭdu de la amant' — paĝio,  
 rigard' mirinda svenas volupte vualata, —  
 sur la dezerta mar' ekŝvebas nokto tria  
 kaj la mallumaj rokoj tutstrange reeĥadas“.

Kaj postkiam finiĝas maldormo trinokta  
 kaj pro laco fleksiĝas linia tali',  
 jen ekestas senĉesaj deliroj narkotaj,  
 ĉar ekserĉas forgeson la melankoli'.

Deliginte zonajon de vigro rubena,  
 tiel fremda ŝi paŝas tra sonĵa kastel'  
 kun okuloj tre palaj kaj strange solena  
 ŝi eniras la halojn de fia bordel'

Ŝi soifas — kaj tie, sub ŝtonaj kolonoj  
 kie tentas ŝin ŝia plenplena pokal',  
 kun la sin' nud-alloga, en flamaj sindonoj  
 fi-bastardojn ŝi vokas por ara regal'.

Kiel muŝoj galhavaj ĉe sabla marĉbordo  
 ili venas el kavoj kaŝitaj, — kaj vin',  
 vin' el sango incitas al krioj malordaj  
 kaj la peka avido kreskadas sen fin'.

Satigite forflagras trinoktaj korbruloj,  
 ja etendas ŝi brakojn en fajra pasi' —  
 maltrankvile ekbrilas okuloj nebulaj, —  
 tamen venĵ', venĵ' jubilas triumfe en ŝi.

Flugis avida tempesto  
 el sia subakva kastel' —  
 kaj ĵus ekstremitate la stel'  
 nube kaŝita jam estas —  
 tondro kaj fulmo ĉielon skuegis . . .  
 — Mi trinkis sorĉerbojn en dolĉa ebri' . . .  
 „Eta princino, ekdormu, forgesu, — ekdormu do vi“

Fajre bedaŭras la vento  
 pri vi kaj pri via fi-glor' —  
 ĉu aŭdas vi, kiel en hor'  
 ondoj potencaj lamentas —  
 lamentas ja ili per via langvoro . . .  
 — Mi trinkis sorĉerbojn en dolĉa ebri'  
 kaj venkis mallumo la lumon per mi . . .  
 „Pala princino, ekdormu, forgesu, — ekdormu do vi“

„Signojn de nigra malsobro  
 forlavis la ondoj — kaj jen —  
 per klar' la lazura maten'  
 potencon tutnovan malkovros  
 por via rigardo triumfa kaj venka . . .“

— Nek pac', nek konsolo reestos por mi!  
 „Vea princino, mi ploras, — ekdormu, forgesu —  
 ekdormu do vi!”

— — — — —  
 — — — — —  
 Orsildon levas la aŭror'  
 sur la trankvilaj akvoj nun,  
 kaj venkis la mallumon sun' ...  
 Per larmoj jam laviĝis for  
 el laca cerb' la rememoro ...

Ho, kiel potencege koron  
 allogas oceana sfer'  
 kaj tra la sentempesta klar'  
 la ondoj vibras en liber', —  
 ho kiel helas post amar'  
 jam elptorita en la ventoj!

Kun rid' senkulpa kor' atendas  
 eĉ pri malklara la vizi'  
 de neĝe-blanka ŝipa vel': —  
 ĝin vidos ja en blua hel'  
 enamiginta la paĝi'  
 kaj flustros kor-sciigon fine ...  
 Espere vibras la princino! ...

Kaj jen — en kreskanta alarmo denove eklumis  
 tri tagoj sencele, ŝancele en pala amar',  
 kaj ŝin en malĝoj' kaj severo denove brakumis  
 lastfoje la noktĉirkaŭpreno ...

— Silentas la mar'.  
 Ho, ĝoio revita, ho goj' sopirita, alvenu!  
 — Silentas senkore la mar'.

Palpebrojn senpovajn nebulas la lac' senespera,  
 ĝojinta rigard' vualiĝas en fuma malklar',  
 kaj morttimigite la birdoj vesperaj  
 alkrias eterajn kurtenojn ...

— Silentas la mar'.  
 Ho, morto izola, ho morto konsola, alvenu!  
 — Silentas senkore la mar'.



Silentas ĝi: ĉe l'bord' tavoloŝ nagra ŝlimo,  
reeĥas por la pek' matura oceano.  
Ekŝvebas tria nokto sur ocean' senlima  
kaj nur obskur' estingas la stelajn karavanojn.

Traĵ. Asen Grigorov.



## Dimĉo Debeljanov.

(1887—1916)

Tiu granda bulgara poeto-lirikisto naskiĝis en la malgranda montara urbo Koprivŝtica, kiel filo de malriĉaj gepatroj. Dum sia infanaĝo li perdis sian patron, kaj restinte orfo, li devis vagi en la grandurbojn: jen en Plovdiv, kiel lernanto, jen en Sofia. En la lasta urbo li brilsukcese absolvis gimnazion kaj poste studis en la universitato juron. Lia vivvojo estis superplena, li devis lukti kontraŭ malriĉo, pene perlabori sian panpecon, por povi vivi kaj studi.

Jam en la gimnazio li verkis versojn, kaj poste li daŭrigis skribi kunlaborante en kelkaj literaturaj revuoj. La zorgo tamen estis lia ĉiama akompananto kaj ne lasis lin trankvila. Lia juneco jam spiras la maldolĉan venenon de la ĉagrenoj pro la vivo.

Entute lia poezio estis vera respeguliĝo de lia vivo. Li neniam afektis, kaj liaj doloroj kaj malmultaj ĝojoj reflektiĝante en lia animo aperis kiel multekostaj perloj en liaj versoj.

Jen kiel dolorplene sonas lia versaĵo —

### DORMAS L'URB'.

Dormas l'urb' en sonĝa sinforĝes'.

De l'perfida nokt' fidela id',

Vagas kun senhejma mi spirit' —

flustras, flustras, flustras pluv' sen ĉes' ...

Ektreminte sur la trotuar',  
 paŝoj kadenceĥas en la strat',  
 kaj post mi, de la sufero frat',  
 pri pasinto iras plendoj — ar'.

Kara reviviĝas en memor'  
 la vizaĝ' infana de knabin'  
 iam sojle lumiginta min —  
 kreskas, kreskas, kreskas la dolor' ...

Venis ŝi kun vekiginta flam'  
 kun rideto flama de l'pasi',  
 sed eternan belon revis mi  
 kaj forpuŝis ŝin kun ŝia am'.

Land' malluma de malĝoj', glaci, —  
 la pasinto restis ie for  
 kaj el tie sendas ŝi kun plor'  
 dolor-krion: kial, kial —ci?

Dormas l'urb' en sonja sinforĝes'.  
 De l'perfida nokt' fidela id',  
 Vagas kun senhejma mi spirit' —  
 flustras, flustras, flustras pluv' sen ĉes' ...

(Traduko de Ivan Dobrev).

Tiel soleca li restis dum tuta sia vivo.

Lin trafis kuglo de homo-frato sur la batalkampo en Macedonio dum 1916<sup>a</sup> jaro. Li mortis kiel kara ofero de la terura Moloĥo Patrujo. Vere, finalo de poeto, por kiu nia lando kaj jarcento ne estis inda!

Krom la versoj, pri kiuj mi parolos en la subaj linioj, li tradukis en bulgaran el Pier Louis kaj Multatuli. Li ankaŭ kunlaboris en humoristaj gazetoj sub la pseŭdonimoj Amer, Jastreb (Akcipitro) kaj Fraŭ Sorge.

Kiel poeto, Dimĉo Debeljanov ĝuas nun la nepran rekonon de ĉiuj bulgaraj literatur-kritikistoj — kaj en Bulgarujo, kie oni estas dividita je tendaroj malamikaj unu al la alia sur ĉiu kampo: politika, kultura, literatura, — tio estas malofta kaj samtempe multsignifa aperaĵo.

Lia tuta verkaro estas negranda: kelkdeko da versaĵoj kaj unu poemo. Dum sia vivo restinte malmulte konata al la pli larĝa literaturema publiko, lia nomo subite ekbrilis kiam oni kolektis kaj elektis liajn poeziaĵojn en unu solan libron: lia Poemaro. Ene: 40 versaĵoj kaj La Legendo pri l'adulta princino.

Por superflua fojo en la literatura historio lia ekzemplo pruvis la fakton, ke la troabunda fabrikado de verkoj venigas al

La aŭtoro la riskon krei malbonkvalitajn verkojn. Ja kiu bulgara poeto ĝuas la ŝaton de sia popolo en grado pli granda — ol Hristo Botev? — Kaj tamen, Botev verkis malpli ol dudek versaĵoj.

Dimĉo Debeljanov verkis nur kiam li devis, kiam estis necese verki.

Kvankam ĉizelitaj kaj poluritaj kiel subtilaj arto-skulptaĵoj, liaj versoj sin distingas per la natura originaleco kaj senpereco de la ekspreso. La poezia elokventeco de liaj versoj ne povas esti nomata retorika babilemo, vanta frazemo, pozado per pompaj vortoj, rimoj, asonancoj — post kiuj sin kaŝas malpleno — per kiuj preskaŭ ĉiupaŝe svarmas la poezio de la junaj poetoj bulgaraj, istoj de la t. n. nova, modernisma poezio.

Tiu talenta poeto unu el la unuaj inter la bulgaraj verkistoj eksperimentis — kaj brilsukcesis — kulturante, prilaborante kaj parte enkondukante novajn versoformojn, rimo- kaj ritmoeblecojn.

La perfekteco de la tekniko en liaj versaĵoj restas nesuperita ankoraŭ de liaj posteuloj kaj imitantoj, kiuj nun multenombre promenadas sur la kulturita vojo de lia ekzemplo.

Liaj versaĵoj prezentas el si finkonstruitaj kaj stile eltenitaj artaĵoj. Ĉe Dimĉo Debeljanov la interna signifo kaj nuanco de la ideo trovas ĉiam egalpezan esprimmanieron ĉe la vorto. La ekstero de lia verso korespondas al ties interno.

Oni ne povas pretere nur pasi plue, ekzamenante la eksteran formon de la versoj de Debeljanov kaj volante difini ĝian signifon por la bulgara poezio. Ĉar tian signifon tiuj ĉi verkoj nediskuteble posedas.

La bulgara poezio apenaŭ konturiĝis en originaleco kaj individualeco post la apero de kelkaj grandaj poetoj. Inter ili Dimĉo Debeljanov okupas ne la lastan lokon. Kune kun Pejo Javorov, la unua nia poeto-simbolisto, Dimĉo Debeljanov majstre prilaboris la bulgaran vorton, kulturis la version, ĉizelis kaj poluris ĝin kiel multekostan diamanton.

Li posedis bonegan eruditecon en la poezi-arto, kaj la lego de modernaj rusaj, francaj kaj anglaj poetoj: Balmont, Brjusov, Belij, Blok, Vjaĉeslav Ivanov, Baudelaire, Verlaine, Samain, Maeterlinck, Francis Jammes, Edgard Poe, k. a. tre bonefike influis lian naturan talenton. De ili li lernis teknike majstri sian version. Grandan atenton li ĉiam turnis al la ekstera formo de la verso kaj ĝenerale de la vorto.

\* \* \*

Tre abunda, tre diversflanka estas la poezio de Dimĉo Debeljanov laŭ motivoj kaj interna vivo de l'animo.

En la tuta verkaro de Debeljanov estas absorbita la veneno de ia stranga vivmalĵojo, kiu ofte jen akutiĝas en malesperon, jen nebulperdiĝas en neesprimeble mildan melankolion. Liaj plej bonaj versaĵoj — liaj elegioj — atestas pri la potenco de la sento ŝprucanta el la fonto da doloroj, kiun kaŝas lia animo.

Tiel pra-malнове kaj simple sonas lia eleganta vorto, tiel mortpale rezignaciās la subpremitaj sopiroj en tiuj elegioj. Tiel milde vualas la animon la krepusko de jena lia

## ELEGIO.

Reveni hejmen en la patra domo  
kiam ekmortas la vesper' humile,  
kaj por azili malfliĉajn homojn  
malfermas mildan sinon nokt' trankvila.

Lasinte kiel ŝarĝon lacon nigran  
senĝoje destinitan de la sorto,  
elveki, kiel gast' post longa migro,  
per timaj paŝoj ĝojon en la korto.

Renkonti vin, patrino, sur la sojlo,  
metinte frunton sur malforta mano,  
fandiĝi en rideto ŝia mola

kaj longe ripetadi: pan'o, panjo . . .

La ĉambron enirinte kun humilo —  
per vi la lasta ŝirmhaveno paca —  
ekflustri mildajn vortojn en trankvilo,  
fiksinte al ikon' rigardon lacan.

Ĉar mia suno estas subirinta  
mi venis ĝisatendi pacan finon.

— — — — —  
Ho, vanaj ĝemoj de la formigrinto  
rememorinta hejmon kaj patrinon.

(Traduko de Zahari Zahariev).

Liaj versaĵoj Sub surdino estas plenaj je la mildo kaj molo de lia koro.

La malĝojo de lia poezio trovas esprimon en multaj korĝeme diritaj versoj preskaŭ de ĉiu lia verko, por trovi sian plej trafan kaj klaran pratonon en lia bonega „Nigra kanto“, kie estas esprimita la tuta duobleco — kaj malespero — de lia animo:

## NIGRA KANTO.

Mi ekmortas kaj hele naskiĝas  
multaspekta, senorda anim'.

Dum la tag' kreas mi sen laciĝo,  
dum la nokt' mi detruas sen lim'.

Se alvokos mi tagojn trankvilajn  
jen ektondras sur maro tempest'.

Se tempeston mi serĉas — senbrile  
preter mi mortas veo, protest'.

Mi soifas je fajra tagiĝo,  
sed blindigas ĝi min kiel sun'.  
Dum printemp' mi aŭtune velkiĝas  
printempfloras mi dum la aŭtun'.

En senhalto de temp' senpasia  
velkas mute la viv' en sufer'.  
Mia plor' por haven' agonias,  
disblovite tra vasta dezert'.

(Traduko de Zahari Zahariev).

La dualismo, la fundamento de la modernisma poezio, enkorpigita en vorton kiel en esprimon de la interne kaŝita, intuitiva vivo de l'homa animo kaj sin manifestanta spontanee, sen kaj eĉ malgraŭ la volo kaj la cerbo — tiu dualismo elektis kiel sian viktimon Dimĉo Debeljanov kaj iin markis per la terura signo de la malbeno. Sed, estante kaptito de sia fatalo, Debeljanov per malpacema spirito ribelis kontraŭ ĝi, kaj estas terure kaj malgaje rigardi kiel li sangante baraktas kaj batas per la flugiloj kontraŭ la severa marmoro de sia ensorĉita karcero. En sia sorto de poeto li iom similas al Edgard Poe, li estas tamen senigita je la malvarma cerbumo de sia majstro; pli varma, pli hejma, pli intima ol ĉiu alia poeto mi sentas lin.

Kelkaj liaj versaĵoj portas en si la naivan aromon de la Blua floro, de la romantismo kaj eĉ de la junknabina sentimentaleco: — liaj amversaĵoj, verkitaĵ laŭ nova maniero. „Hela rememoro“, „Ondoĵ ridetantaj“, „Nevermore“, la neesprimebla milda „Ĉu vi memoras?“ k. a. estas troveblaj en la Souvenir-albumo de ĉiu pala, enamiĝinta gimnaziano.

Dimĉo Debeljanov kreis kelke da klasikaj laŭ ideo kaj konstruo eposoj en la modernisma senco de tiu vorto. Inter ili la versaĵo „Arbaro“ kaj lia plej ampleksa verko — „La Legendo pri l'adulta princino“. Pli ĝuste tio estas lirikaĵoj rakontitaj per la trankvila tono de antikva eposo.

La „Legendo“ entenas kaj respegulas kvazaŭ la tutan vivon de la animo de Debeljanov. Nigra malespero momente lumigata de la ekbriloj de la „suno venkinta la mallumon, kiam per multaj larmoj estas forviŝita la malhonora rememoro pri farita peko“.

Tiu poemo estas saturita per la vivmalĝojo de tuta lia cetera poezio. Kaj ankaŭ tie ĉi sonas — jen triumfe-venĝe, jen malespere — la duobleco de lia rompita, „adulta“ animo.

Al la nebulgara legantaro, kiu ne havas la eblon ĝui liajn verkojn en originalo, mia traduko donos nur palan rebildon de l'originalo — palan, ĉar neeble estas, tuŝante tiujn klasikajn formojn de virga beleco — ne paligi, ne difekti ilin.

En esperanto Dimĉo Debeljanov ektis ĝis nun prezentita nur per du aŭ tri versaĵoj, aperintaj en „Bulgara Esperantisto“.

## Esperanta stilo.\*)

Du specoj de stilo ŝajnas maleblaj en Esperanto: la lingvaĵo arkaika kaj la lingvaĵo popola.

Sed ankaŭ tiuj ĉi malebloj ne estas nepraj.

Esperanto evoluas. Vortoj, stilmanieroj elmodiĝas. Tio ĉi okazas malrapide, sed certe. Legante verkojn el la unua epoko de Esperanto, ekzemple la unuan lernolibron aŭ la Krestomation, oni trovas tie formojn ne plu uzatajn en la moderna Esperanto. Elrigardi anstataŭ aspekti, dome anst. hejme, labore-meco anst. laboremo, tian anst. tiam, kiel se anstataŭ kvazaŭ, rifuziĝi anstataŭ rezigni ktp. — jen formoj, kiuj povus jam nun vekti impreson de arkaikeco, se ... — Sed pri ĉi tio poste.

Ankaŭ la lingvaĵo popola ne estas tute malebla. Pri ĝi jam okazis kelkaj provoj kaj ne tute malsukcesaj. Verbotempo nuntempa anstataŭ estinttempa en rakontado, ofta uzo de ke kaj kaj, inversoj de vortordo iras mi, vidas li ktp. povas doni al la stilo ian popolan aromon. Krome uzo de ne plene konvenaj vortoj, draŝi anst. bati, oreli anst. aŭskulti, piedi anst. iri, heni anst. ridegi, plenbuŝi anst. avide manĝi ktp. La „Proverbaro“ de Zamenhof donas ĉi rilate jam belan materialon. Sed certe tre bonvena estus kolekto de tiaj esprimoj, kunmetita de internacia kunlaborantaro.

Vi vidas ke la Esperanta stilo havas riĉajn perspektivojn. Nun ĝi estas ankoraŭ en ĝerma stato, sed per la mirinda strukturo de la lingvo kaj per la fakto, ke ĝia evoluo okazas tute laŭ la maniero de la vivantaj lingvoj, ĝia kresko kaj riĉa branĉornamo nepre devas veni. Pli aŭ malpli frue certe ankaŭ niaj lingvaj institucioj venkos la malhelpojn, kiuj nun malebligas la pli intensan laboron, kaj esprimvortaroj, proverbaroj, kritikaj lingvaj studoj, pri famaj esperantaj verkoj ebligos, ke ĉio jam farita kaj trovita ne estu enterigita en disaj, ampleksaj volumoj, sed estu facile alirebla al ĉiuj. Kaj nur tiam oni surprize rekonos, kian riĉan trezoron de esprimformoj kaj nuancoj posedas Esperanto jam ankaŭ nun.

Sed al la dezirata evoluo de la Esperanta stilo oni bezonas ankoraŭ ion, kio estas la plej grava afero laŭ mia opinio. Ĝi estas la unueco de la stilo. Tre grave estas emfaze akcenti ĉi tion, ĉar multaj eminentaj Esperantistoj ne rekonis ankoraŭ sufiĉe ĝian esencan gravecon. Ofte mi legis el bonaj plumoj, ke traduko el iu nacia lingvo konservu specialaĵojn de la respektiva lingvo, ke iu traduko estas ĉirna, ĉar ĝi montras al ni interesajn idiotismojn nacilingvajn. Ĉi tiuj opinioj estas ne nur eraraj, sed ankaŭ danĝeraj por la esperanta stilo. Esperanto havas sian

\*) La jena fragmento estas ĉerpita el la parolado de s-ro Kalocsay, kiun li preparis por la ĉi-jaraj literaturaj „Floraj Ludoj“ en Katalunujo.

La kompleta parolado estas presita en „Kataluna Esperantisto“, VI, VII, VIII 1925. Red.

propran spiriton, ĉiu deflankiĝo de ĉi tiu spirito estas simple eraro, same kondamninda, kiel fremdaj naciismoj en iu nacia lingvo. La rumana lingvo, ekzemple, ne havas participojn, ĉu tradukante el ĝi ni esprimu ĉiun particon per aparta frazo? Per ĉi tio ni tute ne akiros la saman efekton, ĉar tia frazkonstruo en la originalo estas tute natura, dum en Esperanto ĝi estas nek utima, peza. Kie do estas la limo de ĉi tiu permeso pri la naciaj apartaĵoj.

Pripensu, ni volas havi stilefektejn! Pro tio ĉi ni bozonas simplan, ĝeneralan stilon, kanvason, sur kiu oni povas brodi. Tia stilo jam ekzistas, estas trovebla en la verkoj de la plej bonaj Esperantaj stilistoj: Zamenhof, Kabe, Grabowski, ktp. Ilia stilo havas propran spiriton, kaj ĉi tiu spirito de la lingvo malfermiĝas por ĉiu, kiu zorge okupiĝas pri bonaj verkoj. Kun iom da sperto oni bone povas konstati, kiom diferencas ĉi tiu spirito de la spirito de lia nacia lingvo, kaj tiam oni estos vere ĝenata, rimarkante, ke en iun lingvaĵon enŝtelis sin fremdlingva spirito. Kiu ne havas ankoraŭ la certan senton pri Esperanto, tiu ekzercu sin per simplaj tekstoj, partoprenu superajn kursojn, legu kaj legu kaj legu, sed literaturajn ĉefverkojn li lasu en trankvilo. Ĉar nek la originalo, nek nia lingvo dankos al li lian penon.

Do ekzistas propra spirito, ĝenerala, ĉiutaga stilo. Ĉiu, kiu aspiras verkistajn laŭrojn, devas nepre disponi pri ĉi tiu stilo. Ĉiu, kiu volas vere ĝui Esperantan literaturon, devas rimarki ĉiun deflankiĝon de ĉi tiu stilo. Ĉar, se okazas tia deflankiĝo, ĝi devas signifi ion! Ne tion, ke la tradukinto estas anglo aŭ japano, nek tion ke li estas komencanto aŭ eterna komencanto, sed ian nuancon, kiun ano de ĉiu ajn nacio esprimus Esperante per la sama stilapartaĵo. Nur tiamaniere ni povas atingi, ke ian intencan nekutiman esprimformon la leganto ne rigardu kiel nacilingvan idiotismon aŭ lingvan kapricon de la tradukinto, sed li eksentu ĝin kiel arkaikan aŭ popolan aromon, aŭ kiel stilapartaĵon de la aŭtoro.

Tia ĝenerala stilo ekzistas en ĉiuj lingvoj kaj nur havante ĝin povas Esperanto kun ili konkuri en la kampo de l'stilo, t. e. en la literaturo kaj poezio.

Kompreneble ĉi tio ne signifas ke la naciaj lingvoj, el kiuj devenas kaj riĉiĝas Esperanto, ne povas ĝin efiki, evoluigi per novaj esprimformoj. Sed ĉiu tia nova esprimo estas bona nur, se ĝi povas kaj devas fariĝi ĝenerala, do ĝi konformas al la internacia pensmaniero, al la spirito de Esperanto kaj donas solvon por mankanta esprimo de nuanco. Esperanto estas vivanta korpo, do same kiel la homa organismo, ĝi ne povas toleri en si fremdan elementon, ĝi ĝenas, dolorigas, malsanigas ĝin. La eksterajn efikojn ĝi devas dismeti kaj sintezi, konformigi al si, kiel la homa korpo asimilas la nutraĵon; nur tiel ili fariĝos vere vivantaj partoj de la lingvo.

Tiamaniere mi imagas la konstantan fekundiĝon de la lingva spirito, la senĉesan evoluon de nia lingvo, per la tradukoj.

## Lingvaj studoj.

### Pri la akuzativo. \*)

La komplemento de verboj kun la sufikso „ig“ estas metata ĉiam en akuzativo.

Ekz. Mi faligas la arbon.

Li klarigas la regulon.

La intransitivaj (netransiraj) verboj kun almetita sufikso „ig“ havas nur unu komplementon, kiel montras la supraj ekzemploj (faligi).

Kiam oni almetas „ig“-on al transitiva (transira) verbo, (kiu en sia radika formo ĉiam postulas post si rektan komplementon) la nova ig-formo postulas du komplementojn.

Ekz. Mi sciigas vin la veron.

Mi vidigas vin la urbon.

Ĉar pro belsoneco oni evitas la amasiĝon de kelkaj akuzativoj unuloke, la regulo ŝanĝiĝas jene. La komplementon de „ig“ oni metas en dativo, t. e. kun la prepozicio „al“ kaj la komplemento de la restanta transitiva radikverbo restas en akuzativo. Tiamaniere la supraj ekzemploj tekstos jene:

Mi sciigas al vi la veron.

Mi vidigas al vi la urbon.

Personoj, kiuj ne povas kutimiĝi uzadi korekte la ig-formon de la verbo kun ĝiaj akuzativoj povas esprimi la saman sencon de la supraj frazoj aliamaniere.

Ekz. Mi igas vin vidi la urbon;

aŭ: Mi igas vin, ke vi vidu la urbon.

## Enlanda Esperanto-Movado.

— La 10—21 de julio okazis en Sofio la XII kongreso de bulgaraj esperantistoj, kiun partoprenis ankaŭ reprezentantoj de la rumana esperantistaro. Malgraŭ la milita stato, estigita pro la okazintaĵoj en la lando, la lasta kongreso denove pruvis, ke la esperanto-movado en nia lando fortike enradikiĝis kaj neniam skuoj povus influi ĝian pluan disvolviĝon. La kongreson partoprenis 81 oficialaj delegitoj (kelkaj sekcioj ne estis reprezentitaj) kaj proksimume 300 gastoj. La kongreson salutis multaj reprezentantoj de oficialaj institucioj kaj aliaj entreprenoj kaj organizaĵoj.

En la nova Centra Komitato de la Societo estas elektitaj sinjoroj: G. Aktarĝiev, Krum Mlaĝov, At. Atanasov, P. Kolev, Z. Zahariev, K. Kirkov, St. Orozov. Kontrola Komitato: V. Gaŝevski, Iv. Dimitrov, N. Vasilev.

\*) El la neeldonita verko „Esperanta sintakso“ — por bulgaroj de Zah. Zahariev.



**Sofio.** Pro la somera sezono, kiu ne estas favora por organiza laboro kaj kursoj, estis aranĝitaj ekskursoj, kiujn multnombro partoprenis membroj de la Centra Sekcio, Poduena Sekcio (kvartala), Studenta Grupo, Lernanta Grupo kaj Sporta Turista Esperanto-Klubo.

Komence de septembro la ĉiuvendredaj kunvenoj plivigliĝis. La Centra Sekcio aranĝis ciklon de popularaj referaĵoj pri diversaj temoj.

Estas preparataj kelkaj kursoj.

**Vidin.** Vigla agado de la loka organizaĵo „Espero“. La 30-an de aŭgusto okazis Distrikta Konferenco, kiun partoprenis reprezentantoj de ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de la Vidina distrikto, en kiuj estas esperantistoj.

Okaze de la 7-taga foiro estis aranĝita belega esperantobudo kaj vesperaj manifestadoj, kiuj efikis tre bone.

**Pleven.** Kun la alproksimiĝo de la aŭtuna sezono la movado denove plivigliĝis. Dum la jarkunveno de la loka organizaĵo estis elektitaj ankaŭ rajonaj kaj distrikta propagandistoj.

**Varna.** La lernanta grupo „Verda Lumturo“, kiu estas nomita dum la nuna jaro Centro de la Ĝenerala Esperanto-Ligo en Bulgario, ekagis por la bona organizado de la esperantistoj-lernantoj.

**Kjustendil.** La grupo „Flamo“ malfermis kurson, kiu, malgraŭ ke estis malfermita dum la somero, estas vizitata de 80 kursanoj.

**Petriĉ.** Nelacigeblaj agantoj tie laboras precipe inter la lernantaro kaj sukcesplene vivas la grupo „Esperanto Triumfonta“.

**Paŝmaklij.** La fondita nur antaŭ kelkaj monatoj grupo bonege propagandas en tiu ĉelima regiono, kie ĝis antaŭ nelonge estis nur apartaj personoj, kiuj interesiĝis pri esperanto.

## Libroj kaj gazetoj

(ni recenzas nur librojn, senditajn en du ekzempleroj).

**Psikanalizo kaj edukado de Pierre Bovet**, profesoro ĉe la Ĝeneva Universitato, rue Charles Bonnet, 4, Genève. Paĝoj 37, ordinara formato, prezo ne montrita.

La libro prezentas la referaĵon legitan de nia eminenta samideano prof. Bovet ĉe la Somera Esperanta Universitato. Ĝi pritraktas la novan metodon de psikanalizo kaj la profitojn, kiujn ĝi donas aplikite en la edukado.

La libro estas reviziita de nia konata kompetentulo en lingvaj aferoj s-ro Petro Stojan, kies nomo estas sufiĉa garantiado por la korekteco de la lingvo kaj stilo. Precipe nin ĝojigas alia afero: la scienca esperanta literaturo pliriĉiĝas. Riĉa scienca literaturo en esperanto! — jen la ilo, pri kiu esperanto nepre kaj certe konkeros por si la indiferentan inteligentan publikon. En tiu direkto la verko de pror. Bovet helpas multe.

Postmorta vivo de Wanisaburo Deguĉi, ĉefo de la Oomoto-movado, tradukis Tadakacu Juri; eldonejo: Oomoto, Ajabe, Kioto-fu, Japanio, paĝoj 11, prezo ne montrita.

Malgranda libreto, traktanta la postmortan vivon el Oomota vidpunkto. Por interesiĝantoj pri Oomojo posedinda libreto.

Fariĝu Stenografo de P. Flageul, 9, B-d Voltaire Jssy les Moulineaux, Seine, Francio.

Malgranda 4-paga broŝureto por propagando de esperanta stenografio.

L'esperanto et ses critiques par W. E. Collinson, professeur de linguistique à l'Université de Liverpool.

Kiel profesoro de lingvoscienco en la Liverpool'a Universitato la aŭtoro science repuŝas la kritikojn de la idistoj kontraŭ esperanton. La broŝuro estas nepre posedenda de propagandistoj kaj kursgvidantoj.

Hebrea progreso en Palestino, eldonaĵo de la Centra Cionista Organizaĵo. London WC 1, 77 Gt. Russel strato, Anglio.

La broŝuro prezentas la disnun fariton por koloniigo de Palestino de la Cionista Organizaĵo. Ĝi enhavas 16 originalajn fotografajojn kiuj montras la koloniigan laboron kaj la novekonstruitan urbon Tel Aviv. La broŝuro estas mendebla senpage de la supreskribita adreso.

Vi sola, Esperanto, povas fari tiajn miraklojn, de Arturo Chez, eldonanto A. Paolet, San Vito al Tagliamento, 1924, paĝoj 40, prezo 1.5 italaj liroj.

Malgranda unuakta teatraĵo, premiita ĉe la X-aj Internaciaj Floraj ludoj. Tre sprita kaj bonhumora legaĵo. Zeze.

— La skizo de Dimĉo Debeljanov (p. 7) estas farita de la pentristo Valentin. La kliŝon ni prunteprenis de la Librejo Filip Ĉipev en Sofia.

— Pro manko de loko en ĉi tiu numero multaj recenzoj estas presotaj en la venonta numero.

— La nuna numero de la revuo malfruis (ĝi devis aperi je la fino de la pasinta monato), ĉar la sola kompostisto ĉe la presejo, scipovanta la esperanto-kompostadon, malsaniĝis. La venonta numero aperos regule kaj ĝustatempe.

La unua numero de VII jaro de Bulgara Esperantisto ni sendas al ĉiuj pasintjaraj abonantoj de la gazeto kaj al samideanoj kiujn ni opinias, ke ili deziras ĝin ricevadi.

Ni petas la ricevintojn tuj sendi sfan abonpagon kaj la nedezirantojn ricevadi estonte la gazeton — resendi la jenan.

**Redakcia Komitato:**

**Asen Grigorov — Zahari Zahariev.**

---

---

## BULGARAJ ESPERANTISTOJ!

Abonu mem kaj abonigu viajn konatulojn al gazeto

# „Есперанто“

la propaganda eldonaĵo de Bulgara Esperantista Societo

La gazeto aperas trifoje en la monato nur en bulgara lingvo kaj ĉiu numero enhavas artikolojn de ĝenerala propaganda karaktero, pri lingvaj demandoj, pri la esp. movado en Bulgario kaj en la aliaj landoj, Societaj organizaj sciigoj k. a.

Jara abono 50 levojn, duonjara — 25 levojn.

---

Mi dankas tre sincere al ĉiuj ĝesamideanoj, kiuj okaze de la trijara naskiĝtago de mia filo Goŝko Trikjakin bonvolis min saluti.

St. Zagora.

Inĝ. Hristo Trikjakin.

---

Sinjoro A. de Varna, Asenova № 23, Bulgario, deziras korespondi nur kun seriozaj sinjorinoj aŭ fraŭlinoj pri edziĝo.

---

---

---

---

---

---

---

---

---

## ANONCOJ

estas pagataj 2 bulgaraj levoj por  cm.

---

# SENPAGE

kaj afrankite ni sendos al vi  
je deziro kelkajn specimenajn numerojn de

## Heroldo de Esperanto

kiu aperas dufoje en la semajno en granda  
formato, kun diversspeca enhavo kaj ilustrita



Skribu tuj al la administracio

## Heroldo de Esperanto

Horrem b. Köln

(Germanujo)

En Bulgario abonigas BULGARA ESPERANTISTA SOCIETO  
str. Car Boris, 69 — Sofio.

Se la gazeto estos ricevata dufoje semajne:

20 numerojn . . . . . 120.— lv.

Se la gazeto estos ricevata du numerojn kune:

20 numerojn . . . . . 90.—

---

---